

**ILEI anoncas :**

## **Pri la 54-a ILEI-Kongreso en 2021**

**2021-06-03**

Ni devas rezigni pri la surloka fizika kunveno en Benino. La anoncoj pri aliĝoj estis tre malmultaj pro la daŭraj limigoj kaj obstakloj en vojaĝado. Tamen la pandemia situacio en Benino daŭre estas tute kontentiga kaj sekura.

ILEI lanĉas virtualan Kongreson, temas pri

### **54-a - ILEI Kongreso VEKI 2**

#### **7 – 14 aŭgusto 2021**

Okaze de tiu evento Benino restos en nia fokuso, ĉefe en la Nacia Vespero.

La kongresa temo estas kaj restas : **“Esperanto-kulturo en Esperanto-kursoj”**

La komitatkunsidoj okazos dimanĉe 8-an kaj marde 10-an de aŭgusto.

Dutaga simpozio okazos ĵaŭde 12-an kaj vendrede 13-an de aŭgusto.

La temposkemo en tri sesioj en ĉiu tago restos la sama kiel en 2020 en VEKI 1.

La teknika organizado estas en la manoj de Unika.

La programa starigo estas en la manoj de Marija Belosevic kaj Mireille Grosjean.

La simpozia koncepto estas en la manoj de Ivan Colling kaj Radojica Petrović.

La aliĝilo estas en preparo.

La Kongreskotizoj estos : por A-landanoj 20 EUR. Por B-landanoj 10 EUR. Por subvenciataj personoj (ni alvokas al A- kaj B-landanoj, ke ili subvenciu unu aŭ plurajn personojn, kiuj ne povas facile transpagi ian sumon al Eŭropo.) 5 EUR. La pagoj povos okazi per ĝirado el UEA-konto de partoprenonto al UEA-konto de ILEI aŭ per ĝirado per kreditkarto al indikota banko en Belgio.

Por demandoj kaj proponoj pri pagado kaj subvenciado turnu vin al Mireille Grosjean :

[mirejo.mireille@gmail.com](mailto:mirejo.mireille@gmail.com).

Por proponoj pri la programo turnu vin al Marija Belošević [miriam010@gmail.com](mailto:miriam010@gmail.com) kaj Mireille Grosjean [mirejo.mireille@gmail.com](mailto:mirejo.mireille@gmail.com).

Por demandoj pri la simpozio turnu vin al Ivan Colling <[iecolling@yahoo.com.br](mailto:iecolling@yahoo.com.br)> kaj Petrović Radojica <[radojica.petrovic.rs@gmail.com](mailto:radojica.petrovic.rs@gmail.com)>

Por demandoj pri la teknika aspekto de VEKI2 turnu vin al Unika [unika@esperantujo.io](mailto:unika@esperantujo.io)

Ni forte esperas, ke tiu 54-a Kongreso estos fruktodona, lertiga, interesa kaj distra.

Nome de la Estraro : Mireille Grosjean, prezidanto.